



# **NORDHUNGARIA INFORMO**

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo  
Miskolc**

Septembro 2008

3. évfolyam 37. szám

|  |    |
|--|----|
| <b>Septembro</b> .....   | 3  |
| <b>Karaj niaj legantoj!</b> .....  | 3  |
| <b>La Granda Mondvojaĝanto</b> .....                                     | 3  |
| <b>Tibor Sekelj</b> .....  | 3  |
| <b>TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO</b> .....                               | 5  |
| <b>TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO</b> .....                               | 6  |
| <b>ESPERANTO – SKOLTA MOVADO EN HUNGARIO</b> .....                       | 12 |
| <b>TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO</b> .....                                    | 14 |
| <b>Interesaj eroj pri IJK-2008 en Szombathely</b> .....                  | 16 |
| <b>Rotterdamo – UK</b> .....   | 17 |
| <b>Hungaraj esperantistoj en Nederlando</b> .....                        | 18 |
| <b>Agado per blogado</b> .....   | 18 |
| <b>CERBAJ IMPULSOJ</b> .....   | 20 |
| <b>HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO</b> .....                    | 20 |
| <b>La bildkartoj devenas de Miskolc</b> .....                            | 22 |
| <b>Anoncoj</b> .....   | 23 |
| <b>100 jariĝo de la esperanto movado en la pollanda urbo ŁODZO</b> ..... | 24 |

## Septembro

### Karaj niaj legantoj!

Ni - verkantoj kaj redaktantoj de tiu-ĉi retgazeto monate aperanta, - salutas Vin!

Ni dankas, ke vi legas niajn komunikojn kaj sendas viajn verketojn al ni, jam ekde tri jaroj, por kolorigi nian gazeton. Ĉimaniere kaj nun ni dankas ankaŭ la ĝisnunan laboron de niaj reviziantoj kaj konsilo-donantoj.

Ni petas, ke vi daŭre ne preteratentu, sed priatentu ankaŭ la numerojn de la nun ekiranta nia kvara jarkolekto.

Por tio ni deziras al vi ĉiuj: bonan sanon, multe da ĝojo kaj kontenteco.

Geedzaj Pásztor

### La Granda Mondvojaĝanto

#### Karaj niaj legantoj !

Pri la granda mondvojaĝanto Tibor Sekelj , ni rememoras nun, en jaro de la 20-a datreveno de lia morto.

Bonvolu legi estimplene pri lia vivo kaj verkaro la kompilaĵon, alveninta de la OIK (Landa Fremdlingva Biblioteko Budapeŝto).

Ni, unue publikigos lian poemon TAMBURO: ricevinte ĝin - de s-rino Terezija Kapista – poste - en partoj – lian verkon

Temuĝino la filo de la stepo, kiun Terezija Kapista, la eldonistino de la Sekelj libroj esperantigis kaj ni publikigos ĝin rete per ŝia permeso. Ĝin sekvos la alia verko de Tibor Sekelj:

Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo.

Adrienne, s-rino Pásztor

### Tibor Sekelj



La fama mondvojaĝanto, vojaĝpriskribaĵverkanto naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en la altregiona Szepeszombat /Sepeŝsombat/ kaj mortis la 20-an de septembro 1988 en Szabadka. Oni metis lin al eterna ripozo en urbo de Deziderio Kosztolányi. Li edukiĝis en Transilvanio, studis en gimnazio en Nagyikinda kaj abiturentiĝis en la montenegroa Nikšic. Li ellernis la juron en urbo Zágráb laŭ deziro de sia patro kaj diplomiĝis. Li estis en 90 landoj, travagadis la ĝangalojn, stepojn, dezertojn. Li ekkomprenis 25 lingvojn, laŭ naŭ lingvoj parolis, skribis kaj legis. Li estis longtempe prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio. Li publikigis multajn librojn, liaj 30 volumoj aperis multlingve. =Ne hungare li skribis liajn librojn.

/ Sur tero de indianoj, Nokte kliniĝas la palmarboj, Ŝtormo sur la Aconcagua, Gyambo, En ĝangaloj de Brazilio, Sur la insulo de Papuoj, La mondon iranta

ĉasisto, De Patagonio ĝis Alasko, Post unu jaro, Inter kanibaloj, / Li skribis la sekvajn en antaŭparolo de sia iu libro:” Kien mi apartenas? Al tiuj lokoj, kie mi estis ĝis ĉi tiam. De ĉiuj lokoj mi kunportis ion kaj ĉie mi lasis iun pecon de mi mem...” / Nokte kliniĝas la palmarboj.  
/

Pasintjare nomo, verkaro de la fama mondvojaĝanto, vojaĝpriskribajverkanto rolis ofte en ĵurnaloj de Vojvodino kaj en ceteraj revuoj. Ankaŭ Elizabeto, edzino de Tibor Sekelj alparolis al la ĵurnalistoj, ke sia edzo havis gravan deziron: lia plurcentpeca kolektaĵo restu en urbo Szabadka, kaj nur la urba konsilantaro prizorgu pri meto de tiuj kaj pri la rigardeblecoj.

„ Por Tibor Sekelj estis la plej grava ĉiam kaj ĉie la malegoisma amikeco – diris ŝi -, sed ĉar li ne povis kunporti la ekkonatajn homojn el Aŭstralio, el Afriko, el Sud-Ameriko, la instrumentoj, ĉapeloj, maskoj memorigis lin tiujn jarojn, dum tiuj li povis fari longajn vojaĝojn. Tibor estis muzeologo. Li akcelis multfoje, ke lia kolektaĵo estas nur en tuto valoraj, aparte la pecoj ne povos havi signifan intereson....”

Post la deklaro estis muta silento. Ni forgesadis ankaŭ pri Tibor Sekelj, kiel ni forgesis meritojn de Emerigo Dévics, verkaron de Ladislao Szekeres, al formiko saman diligenton de Ladislao Magyar. Tibor Sekelj donacis al la urbo la plej grandan kolektaĵon de la regiono. Li estis hejme en la granda mondo, en ĉiuj kontinentoj de la Tero. Lian romanon, la titolan Kumevava, filo de la ĝangalo oni tradukis al dek ses lingvoj kaj ankaŭ en Japanio ĝi aperis en plurcentmil ekzempleroj. En 1981 oni proklamas al junulara romano de la jaro en lando de la leviĝanta suno. En sia maljuna aĝo li agadis en Szabadka kiel muzeodirektoro inter 1972 kaj 1976. Li apartenis al tiu urbo.

Li faris lian unuan vojaĝon sur sledo, sed jam kiel infano li sopiris la pli grandajn, valorhavaĵojn vojaĝojn. Li delevis ofte la Pallas Grandan Leksikonon de libroreto de sia patro, kaj sur la tapiŝo kuŝante sur ventro komencis rigardadi ĉiun. Li legis multe pri Afriko, Usono, Azio, Aŭstralio. Li rigardadis al la artikoloj aldonitajn mapojn kaj post enlitiĝo lamentis pri tio: kial fluas la rivero tien, ja al alio ties vojo estus pli mallonga? Kial similas insulo de Celebes al la araneo? Kiaj homoj vivas en la ĝangalo? La infano, Tibor Sekelj tiam decidis, ke iam li travagados la mondon, estos mondvojaĝanto...

La familio translokiĝis el la montaro Tatra, el Spišska Sobota al Rumanio, al Cenei. Tibor iu vespere kaptis la fosilon, rapidis en la ĝardenon. Li volis atingi al transflanko de la Tero. Sed lia patro atentigis lin, ke tie estas varmego kiel en la infero. Pro tio ili restu ĉi tie, kie naskiĝis. Tibor Sekelj ellernis la germanan, serb-kroatan lingvojn kaj parolis laŭ lingvo de la Gaŭloj. En Nagyikinda jam li instruis francan lingvon. Li lernis ankaŭ pentroarton kaj skulptoarton. Li finis dramaturgon antaŭ la dua mondmilito. Li estas en Argentino dum la dua mondmilito, de tie la jugoslava registaro vokis hejmen kaj en 1954 li hejmenvenis. Li estis en ĝangaloj de Amazono, en Sudano, en Somalio, kaj en vilaĝoj de montaro Himalaja. Lia verkaro estas: vojaĝanto, poliglota-esperantisto, muzeologo, ĵurnalisto, vojaĝpriskribajverkanto.

Li iras per ŝipo al Argentino, al urbo Buenos Aires en 1937 komisiite de iu revuo, kie iĝis kunlaboranto de pluraj revuoj. Iu svisa montogrimpanto, Hans Georg Link petis lin por aliĝi al sia ekspedicio. Lia kariero ĉi tiel komenciĝis...

Li ellernis la etnografion, antropologion kaj arkeologion. Li iradis en ĝangaloj de Brazilio, en vilaĝoj laŭ Amazono, li renkontiĝis ankaŭ kun kanibaloj, li atingis Bolivion, transiris sur la Mortorivero, /Rio das Mortes/, li travagadis regionon de Mato Grosso, ŝipadis sur akvo de

Itenez, kaj li trovis ankaŭ nekovritajn ĝangalojn. Lian libron, la Ŝtormo sur la Aconcagua titolan skribis al tiuj, kiuj mortis dum grimrado de la montopontoj. / Multe da ĉi tiaj entreprenoj postulis morton./ Li vojaĝis per vagonaro, ŝipo, eĉ skiante. Li iris kuraĝe sur elefantdorso en la ĝangalojn, li renkontiĝis kun ŝtatviroj, triboĉefoj, artistoj, migrantoj, vagabondoj, petrolmagnatoj kaj arabaj ŝejkoj. Li manĝis en Irano littolmezure ~~de~~ flanojn kaj li ŝmace sorbis en vilaĝoj de montaro Himalajo kun ranca butero kondimentitan teon. Li manĝadis en Ĉinio per bastonetoj ŝarkonaĝilojn. Li gustumis en la ĝangalo la serpento- kaj simioviandon. La delikatajn manĝaĵojn li manĝis el arĝenttelerio, aŭ de bananfolio pere de siaj fingroj, aŭ per orumita kulero.

Li naskiĝis ne ĉe ni, sed iĝis nia homo. Li estis 75 jara, kiam ricevis la merititan vivoverkopremion. Tiutempe li deklaris tion: „Tio estas agrabla surprizo por mi, ĉar mi ne atendis tion. Bonas, ke ĝuste de tiu urbo mi ricevis tiun, kiun mi elektis kiel hejmo: de urbo Szabadka.....”

[www.hetnap.co.yu/uj/index.php?zg=3042&no=117 – 24k](http://www.hetnap.co.yu/uj/index.php?zg=3042&no=117-24k)

/ De la Landa Fremdlingva Biblioteko laŭ komuniko de s-rino Ilona Böde./

## **TIBOR SEKELJ**

### **TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO**

**Tradukis Terezija Kapista**

**La titolo de la originalo TEMUDŽIN – DEČAK STEPE**

Lektoris, la poemojn tradukis kaj la titolpaĝon desegnis: Marko Petroviĉ

Ilustris: Hunor Ĝurkoviĉ

Kompostis: Dimitrije Janiĉiĉ

Eldonisto TEREZIJA KAPISTA

Novi Beograd

Studentska 39/23

Jugoslavio 1993.

Presis: SZR sava Todorov, Dubrovaĉka 3 Beograd

Eldonkvanto:500

## TIBOR SEKELJ

### TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO

Tradukis Terezija Kapista

La sekreta historio de  
Mongoloj

- Parto unu -

Mia deziro viziti antikvan monakejon Erdeni-dzu, en interlando de mongolia stepo, fore de iu ajn urbo, ŝajnis nerealigebla. Ĉiuj atentigis min, ke el urbo Ulan-Bator, aŭ el iu ajn alia loko, mi ne povos travojaĝi tiun vojon, en ĉi tiu jarsezono, ĉar okazas riverleviĝoj, pro la senĉesa pluvo en montaraj regionoj dum lastaj tagoj.

- Ne, neniu veturisto akceptos veturigi vin. Ĉiuj scias, ke la riveroj estas akvoplenaj en nunaj tagoj kaj ponto ekzistas nenie.

Mia amiko Ĉimidsuren diris tion al mi tiel konvinke, ke ne restis dubo pri seriozezo kaj vereco de lia certigo. Sed mi ne lasis min facile konvinki.

- Ĉu tio signifas, ke la monekejo estas tute izolita de cetera mondo? Kiun farus iu loĝanto de monakejo, se li ekdezirus urĝe veni al Ulan Bator?

- Nu, tio estas io alia. Vi ja scias, ke ni mongoloj moviĝas per niaj malgrandaj, sed rapidaj, tre eltenpovaj ĉevaloj. Ili facile povas transvadi, eĉ transnaĝi la inundriveron. Certe, vi ankaŭ scias tion, ke la eksterlandanoj ne rajdas niajn ĉevalojn. La ĉevaloj simple ne toleras ilin en la selo. Iujn ĵetis de sur si tiel, ke lasis ilin la volo denove provi tion.

Jes, mi scias pri tiaj okazaĵoj. Tamen, mi ne povas kredi, ke ĉevalo rekonas, ĉu sur ĝia dorso sidas Mongolo, aŭ fremdulo. Dum momento trairis mian kapon multaj miaj spertoj rilate al ĉevaloj. Mi ŝatas ĉiujn bestojn, precipe la ĉevalojn kaj ŝajne ili sentis tion. Mia rilato al tiuj rasaj bestoj ĉiam estis amikaj ili sanmaniere reciprokis tion al mi: kiam ajn ĉiuj aliaj veturiloj perfidis, la ĉevaloj ĉiam montris la grandan komprenemon al miaj bezonoj. Kial ne, ankaŭ nun?

- Amiko, mi havas ideon, - mi diris al Ĉimidsuren. En la kazo, se via ĉevalo konsentus ekporti min, ĉu vi ekiros kun mi ĝis la monakejo Erdeni-dzu?

- En tiu kazo, tre volonte! Kaj tuj morgaŭ, se vi volas.

La morgaŭan tagon, tuj post sunleviĝo, mi renkontiĝis kun Ĉimidsuren, laŭ la interkonsento tie, kie finiĝas la urba strato kaj kie al vojaĝanto malfermiĝas larĝa, senfina stepo. Mia amiko rajdis sur unu ĉevalo, kaj la alian gvidis, tenante la bridon.

Senvorte, li transdonis la bridon al mi. Por momento mi staris hezite. Tiam mi prenis du sukerkubojn el mia poŝo kaj Dorat – kiel mi nomis mian ĉevalon pro ĝia malhela kolora – dum momento formanĝis ilin ambaŭ el mia mano. Tion ĝi faris tiom avide, ke mi opiniis, estos la plej bone regali ĝin per ankoraŭ du sukerkuboj, ankaŭ ilin ĝi senhezite akceptis.

Ŝajnis al mi, ke mia unua paŝo survoje al amikiĝo estis sukcesa.

Mi ekkaresis la frunton de Dorat, ĝi ne rezistis. Ĝi eĉ akceptis, ke mi karesbatadu ĝian kolon.

Mi opiniis, ke jam tempas ekagi. Mi puŝis la piedojn en piedingojn kaj enseliĝis.

Mi eĉ ne pensis pri tio, ke la amikeco inter Dorat kaj mi estas konfirmita. Sed mi pri la sekvontaĵo eĉ songi ne povis.

Dorat komencis saltadi alten de sur la tero kaj levadis la malantaŭajn piedojn tiel, ke mi komencis altensalti duonmetron super la selo. Mi lasante la bridojn el la manoj, forte prenis la

selon per ambaŭ manoj kaj per la kruroj plenforte ĉirkaŭpremis la ventron de mia diable maltrankvila virĉevalo

Kiam Dorat rimarkis, ke mi bone ennestiĝis sur ĝia dorso, li eĉ pli koleriĝis kaj pli firme decidis ĉiupreze forĵeti min.

Ĝi prancis preskaŭ vertikale svingante per antaŭaj hufoj. Nenio restis al mi farebla krom forte ĉirkaŭbraki ĝian kolon. Saltadis svingante per kapo tien-reen, kun intenco liberiĝi de mi. Miaj plandoj elfalis el piedingoj, sed mi permane, forte tenis min al ĉevalkolo.

Tiel pendante mi direktis rigardon al Ĉimidsuren. Li trankvile sidis sur sia malhelbruna ĉevalo kaj observis nian batalon. Mi ne scias, kiun li favoris, ĉu min, aŭ la mongolan ĉevaleton, kiu persiste defendis dignon de sia ĉevalraso, ne permesante, ke ekrajdu ĝin la nemongolo.

Tiuj kelkaj minutoj da lukto probable ŝajnis al mi eterneco. Verŝajne ankaŭ al Dorat, ĉar subite, lacspiranta kaj ŝvitanta ĝi malleviĝis kvarpieden.

Mi decidis profiti la momenton de ĝia laciĝo. Mi streĉis la bridojn tute mallonge tiel, ke la ĉevalo povis eĉ ne movi la kapon. Mi sukcesis repiedingi la plandumojn kaj kelkfoje sproni per kalkanoj la ventron de Dorat. Tiam li ankoraŭ iomete saltadis kaj retroiris pro la doloro, kiun kaŭzis la premo de la enbuŝaĵo. Tiam mi malstreĉis la bridon forte sproninte ĝin.

Mia virĉevalo ekgalopis rapide kaj kontinue, tiel ke Ĉimidsuren preskaŭ ne sukcesis atingi nin.

Inter mi kaj Dorat la amikeco estis konfirmita.

Kaj ĝi ekmanĝis nek ĉe la bezono trairi malvarman riveron, nek dum ĝi estis lasita libere paŝti sin laŭ vole, en alta stepa herbo.

Mi tranoktis en la jurto de Cecendorĝo, kiun mia amiko jam konis de antaŭe. Lia jurto, tiu ronda tendo de felto kaj tolo, solece situis meze de stepo.

Gejunuloj prizorgis la bestojn, kiujn ili ĵus alvenigis el ĉirkaŭaj paŝtejoj. Estis ĉi tie ĉevaloj, bovoj, duĝibaj kameloj, ŝafoj kaj „jak“-bubalo-speco de negrandaj bovoj kun longaj feloj, vivantaj en malvarmaj aziaj stepoj.

La edzino de Cecendorĝo, kun kapo envolvita en puran blankan tukon, estis sidanta sur malalta trippeda seĝeto kaj melkanta la ĉevalinon. Du siteloj plenaj da lakto staris apud ŝi. El tiu lakto ŝi poste preparos kumison, ŝatatan trinkaĵon de Mongoloj, kiu similas al jogurto.

La dommastro venigis nin en la jurton tra malalta kvadrata pordo, gvidis nin maldekstren de la fajrejo kaj montris benkon en fono de l' tendo, por ke ni tie sidiĝu. Ni sciis, ke tio estas la honorloko en la tendo kaj akceptis ĝin, ni dankis tiun honoron per diskreta riverenco.

La dommastrino baldaŭ eniris. Ŝi regalis nin per la teo, kiu estis bolonta en pendkaldrono super fajrejo, meze de tendo. La teo estis blankkolora pro la lakto en ĝi, sala kaj grasa por la grasa peceto de ŝafviando en ĝi kunkuirata. Komence, tian teon estis malfacile engluti. Sed nun, mi jam alkiutimiĝis al ĝi, povante trinki ĝin sen grimaco, por ne ofendi la dommastron. Mi ellernis ankaŭ tion, ke la trionon de teo mi devas lasi en la taso, ĉar se mi fortrinkus la tuton, ili tuj denove plenigus la tason.

Ĉimidsuren kaj Cecendorĝo mallaŭte kaj modere interparolis pri ĉiu. Mia amiko rakontis ankaŭ pri evento de mia unua rajdado sur mongola ĉevalo kaj la dommastro atenteme aŭskultis kaj akompanis ĉiun frazon per delikataj miresprimoj „ĉu vere?“, ĝuste tiel?“, „bravo!“, laŭ loka moro.

Ni tranoktis sur molaj drap-kuŝejoj kaj ŝafaj feloj, kovritaj per la propraj kovriloj.

Kiam mateniĝis, mi adiaŭis niajn gastigantojn kaj forkuregis al stepo. Ŝajnis al mi en tiu momento, ke ĝi nenie komenciĝas kaj senfinas. Serena blua ĉielo, sen ajna nubeto, intime rilatis kun horizonto en grandega cirklo ĉirkaŭ ni.

En posttagmezaj horoj per pramo ni transiris torentan riveron Orhan. Se ni ne estus trovintaj la pramon, ni ne povus transiri la riveron, eĉ surdorse de niaj ĉevaloj, sen esti malsekaj ĝis talioj.

Nur unu horon poste sur la horizonto antaŭ ni aperis tegmentoj. Tuj poste, ankaŭ muroj de iuj konstruaĵoj.

Mi demandis rigarde mian amikon: Li ridmiene kapjesis.

- Erdeni-dzu!
- Ni rapide alvenis!
- Se la ĉevalo estas laŭ via volo, vi ĉien rapide alvenas. Sur kaprica ĉevalo la vojo estas senfina - sentencis Ĉimidsuren kaj mi tute kunsentis kun li.

Post frapado al peza, ligna pordego, ni estis lasitaj eniri monakejon, ĉirkaŭitan per altaj muroj, kun observaj turoj kaj pluraj konstruaĵoj kun ornamtegmentoj el verdaj tegoloj. La tegmentoj respegulis la posttagmezan sunon, donante solenan pompon al modesta monakeja medio. Ĉi tie kaj aliloke iu monako, ĉirkaŭvolvita en brunan, aŭ ruĝan mantelon, per modelaj paŝoj, trapasas el unu konstruaĵo en la alian.

Estis bezonata havigi permesilon por ke mi povu uzi la bibliotekon. Mi ricevis ĝin. Mi trairis la ejojn, akompanata de lamao-bibliotekisto. Li klarigis al mi pri kio parolas la libroj, vicigataj sur la sennombraj bretoj.

- Sed kie troviĝas la „Ruĝa Kroniko” aŭ „La Sekreta Historio de Mongoloj” – demandis mi kun timotrema koro, ĉar mi timis, ke mi ne povos vidi la libron, pro kio mi alvenis al Erdeni-dzu.

La monako-bibliotekisto senvorte prenis de sur iu breto la libron kaj metis ĝin en miajn manojn. Kiel ĉiuj mongolaj libroj, ankaŭ ĉi tiu konsistis el unuopaj nekunligitaj folioj, kun du malmolaj kovriloj ĉirkaŭvolvitaj kaj ligitaj per la rubando. La kovriloj estis ruĝaj, tial la libro estas nomata „Ruĝa Kroniko.”

Sidiĝinte ĉe la tablo, mi ankoraŭ forte premis la libron inter manoj. Mi estis nekutime emociita.

Lamao-bibliotekisto jam la trian fojon atentigis min ke la libro kiun mi tenas en miaj manoj ne estas originalo. Sed lia insistado estis superflua. En monekejo Erdeni-dzu, meze de mongola stepo, du tagojn da galoprajdado de Ulan-Bator, ne povis esti la originalo de tiu libro. La sciencistoj, fakuloj pri mongola literaturo jam trastudis ĉiujn librojn de tiu ĉi biblioteko, serĉante la perlon de mongola literaturo nomitan „Ruĝa Kroniko” aŭ „Sekreta Historio de Mongoloj.” Tiel oni konstatis, ke la originalo senspure malaperis antaŭ kelkaj jarcentoj. La libro, kiun mi enmane havis, ekestis multe pli poste kaj ĝi estas tradukita el diversaj tradukaĵoj.

Ĝi aĝas nur tri aŭ kvar jarcentojn.

Sed, en ĉi momento por mi tio ne gravas.

En unu momento mi forte premadis, eĉ delikate mi karesis la ruĝajn kovrilpaĝojn de tiu ĉi libro, ne nur pro ĝia antikveco. Tio, kio ravis min en tiu ĉi libro estis la nekredebla sorto de knabo, kiu dank’ al sia forta volo, lerteco kaj persistemo, estiĝis tio, kio antaŭ li neniam ekzistis: Suvereno de la plej vasta lando en la mondo.

Mi malfermis la libron. Liberaj folioj de duonmetron longaj kaj nur manlarĝaj, estis flaviĝintaj pro la tempopaso. Strangaj vortoj, skribitaj per la malnov-mongola skribmaniero, glitantaj sur flavaj paĝoj kiel etaj misteraj serpentoj. Rakontante la mirindajn historiojn el antikveco al tiu, kiu scipovis kompreni ilin. Sed mi ne scipovis legi tiun ĉi libron kaj ĝia enhavo povis al mi resti nekonata.

Sed la entuziasmo, kiun mi montris, transiris al monako kaj li komencis paroli al mi, rakontante la enhavon de la libro, la vivon de unu el plej eksterordinaraj homoj en tiu fora ekstremo de Azio.

Por pli bone rememori la detalojn la lamao foj-foje fermis la okulojn serĉante simplajn vortojn por ke mi pli bone komprenu lin.

Tra lia buŝo revivis la stepo. Mi povis aŭdi la hufbatadon de ĉevaloj kaj la fajfadon de l’ stepa vento, voĉojn de l’ homoj, vivintaj tie antaŭ multaj jarcentoj.



La sekreta historio de Mongoloj ekparolis tra la buŝo de l' monako.

- ni daŭrigos -

Karaj legantoj!

Ĉu vi ŝatus konatiĝi kun sinjorino Tereza Kapista, kun la tradukistino de ĉi verko de Tibor Sekelj? Nun venis la okazo, ke vi kaptu la ŝancon por tio.

El la retgazeto **PRIMARA** (jaro II.nro 7) verkita de sinjoro Dimitrije Janićić el Serbio, ni ricevis foton de sinjorino Terezija Kapista. Sed ŝian biografion siamane skribitan ni prezentas nun al vi:



## TEREZIJA KAPISTA

„Mi naskiĝis en Subotica la 11-an de aprilo 1930. Laŭ nacieco hungarino, stateco jugoslava, (nun Serbio) sed laŭ la ideologio mi apartenas al organizaĵo de MONDCIVITANOJ.

Mi esperantiĝis en la jaro 1985. La unuan kurson finis ĉe Antonio Sekelj kaj la B kurson ĉe Tibor Sekelj. En Esperanto Insitudo en Hag-Nederlando, mi akiris Ĉeh metodon instruistan diplomon. Mi ankaŭ volontulis ĉe IEI en Hago.

Mi estas D kaj FD por Cseh metodo de UEA. Mi vivas en Beogrado.

Mi laboris dum 36 jaroj senĉese kaj estas emerita kiel juristino sed mi finis ankaŭ Pedagogian Akademion.

Ekde 1996 mi estas vicprezidanto de Beograda Fervojista E. Asocio.

UK-ojn mi ĉeestis en Beijing 1986, Warszawa 1987, Rotterdam 1988, Habana 1990, Tampere 1995, Praha 1996, Zagrebo 2001, Florenco 2006, Jokohamo 2007, Rotterdamo 2008..(entute 10)

ILEI porinstruistajn kongresojn mi partoprenis 6 foje.

LF –Literaturan Forumon en Gdansk-Pollando. Eger-Hungario kaj Napoli - Italio.(3 foje)

SAT kongresojn mi partoprenis 7 foje (3 foje prelegis). En 2006 la SAT Kongreso okazis en Beogrado kaj mi estis la prezidanto de OKK.

IFEF- Fervojistajn kongresojn mi partoprenis 11 foje (4foje prelegis)

KURSOJN, mi gvidis en mia lando en elementaj kaj mezlernejoj, al geinstruistoj, sed ankaŭ en kluboj kaj studentaj hejmoj, kaj al nehomogenaj grupoj en diversaj urboj. Komence mi laboris laŭ Zagreba metodo, poste laŭ Cseh metodo kaj foje laŭ Gerda Malaperis. Mi uzas Mazzi kurson kiam eblas. Eksterlande mi gvidis kursojn en Hungario, Germanio, Francujo, Nederlando, Italio, Brazilo, (dum 3 monatoj en multaj urboj) Pollando, Aŭstralio, Nov-Zelando, Ukraino ktp. Mi tradukis 4 teatraĵojn kiuj estis ludataj dum kongreso, ĉiam Saŝa Pilipovc estis la aktoro, eble la plej sukcesa estis Galileo en Jokohamo. Mi estis la realiganto de la projekto de UEA LINGVO DE PACO en Irano, kaj gvidis la Internacian seminarion en

Burundo en Afriko ktp. En tiuj kursoj mi ankaŭ uzis la Aŭdvidan metodon de A. kaj T. Sekelj, kaj Paroligan libron de Katalin Kovats. Mi gvidis pli ol 120 kursojn.

Mi ĉeestis naciajn kongresojn 2 en Jugoslavio, Hungario, Brazilo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Germanio, Pollando, Italio... Entute mi vizitis 54 landojn ĉiam faranta ion por E-\*to

Balkanlandaj renkontiĝoj, trilandaj kaj aliaj diversaj aranĝoj preskaŭ ne povis pasi sen mi. En 1998. jaro en Beogrado mi estis la organizanto de *Danuba rendezuo*, kies ĉef- organizanto estas Literatura Foiro el Svislando kaj ĉeestis ĝin ĉ. 120 personoj kaj la Bulgara E. Teatro ludis 3 teatraĵojn.

En 2003, mi estis ano de organiza triopo de *90. jara Jubileo de Esperanto organizaĵoj en Beogrado*. Ĉeestis pli ol 130 personoj kaj anoj el Teatro Kragujevac, ludis Kabaredon, kiun mi tradukis kaj kiu estis ludata ankaŭ dum UK en Goteborgo-Svedio aperis KD kun la kantoj de ĉkabaredo.

ELDONADO, mi okupiĝis ankaŭ pri tio, sed la malbona ekonomia situo kaj la interna 10 jara milito bremsis tion.

1. Mi aperigis mian tradukon al esperanto de Tibor Sekelj „*Temuĝin la filo de la Stepo*” (1993) kiun li verkis en serba lingvo.
2. Mi aperigis la libron de Branimir Sćepanoviĉ, „*Buŝo plena je tero*” (1994) kiun elserbigis Antonije Sekelj.
3. Mi eldonis la unua en la mondo, libroforme, mian tradukon de faklibro de Masayuki Saionjhi „*Speciala Orienta Diina Masagho*” (1990)
4. Eldonita estas la de mi tradukita libro de Bruno Vogelmann „*Nova Realismo*” (1996 ĉ.250 paĝoj)
5. Proprakoste mi aperigis mian tradukon de Martin Kojc „*La lernolibro de la vivo*”-du eldonoj (1993,94)

Mi verkis libron kun titolo „*Esperanto-lingvo de paco en Irano*” pri la realigita projekto de UEA “Lingvo de paco” (2004). Kaj la libron “*Esperanto-Lingvo de Paco en –Burundo-Afriko*” (2005). La samajn librojn mi eldonis ankaŭ en la serba lingvo. Dume mi eksciis ke ili estis eldonitaj en Slovaka kaj Itala lingvoj.

.Ken Keys Jr “*La Centa simio,*” kiun mi tradukis el E-to al serba lingvo aperies en 2007.( ekologio kontraŭ atomuzado)

PRETAJ POR ELDONO ATENDAS:

La traduko el serba al E.to de Rajko Radovanović „*La usona filmo kaj kiel eviti ghin*”(200 paĝoj)

Kaj 5 aliaj por ne longigi la liston.

Mi tradukis ankaŭ mallongdaŭran filmon „*Nostalgio*” pri malnova fervojlinio kiu kun mia E- teksto estis prezentita dum IFEF kongreso en Budapeŝto.

Mi tradukis ankaŭ la komedion de Viktor Lanua „*Malfermilo,*” kiun prezentis du aktoroj el Kragujevac dum UK en Zagrebo.(2001). Kaj „*Kiel kaj kial mortigi la edzinon*” kiu komedio estis ludata en Vilno dum UK en Litovio.(2005). Tekston de B.Brecht „*Vivo de Galilejo*” estis ludata dum UK en Jokohamo en 2007. Universala kabaredo kiun mi kaj tradukis, kompilis kaj parte verkis, ludata en Rotterdamo.

Plur foje mi legis kaj korektis tekstojn de E-tradukistoj, ankaŭ helpetis iom en Nova PIV kiun eldonis SAT en la jaro 2003. En 2005 mi estas la redaktoro de poem-kolekto “*MIOZOTO*” de Margarethe-Greta Stoll.

Mi aperigis ARTIKOLOJN en diversaj lokaj ĵurnaloj, kaj inter 1989 kaj 1991 redaktis „*Infosel*” monatan informilon de Serbia Esperanto Ligo.(aperis 17 numeroj, 8 paĝaj)

PRELEGOJ, mi faris diversajn prelegojn dum miaj vojaĝoj aŭ revenante ĉar mi estas fervora fotisto. Posedas pli ol 2100 lumbildojn kiujn mi uzas dum miaj prelegoj en lernejoj, kluboj,

bibliotekoj, en multaj landoj kaj multegaj urboj. Ĝis nun mi faris ĉ. 220 prelegojn, nature favore al E-to kaj ĉiam senpage. Nun mi uzas digitalan fotilon kaj KD kaj ne plu lumbildojn. KORESPONDADIS mi kun pli ol cent samideanoj ĝis kiam ne plu povis pagi la sendokostojn, kaj nun savis min la interreto tiurilate. Nun mi uzas la reton korekti tekstojn al E istoj kiuj petas de mi tion, el la tuta mondo ekz. N. Zelando, Afriko, Oceanio, Irano, Germanio ktp.

Mi estis peranto de Juna amiko (kiam mi sukcesis havi po 250 abonintojn, sed tiu tempo por ĉiam pasis) EPCX, Heroldo, Literatura Foiro, E.Vegetarano ktp.sed lastatempe NE, niaj samideanoj ne plu havas monon por ĵurnal abonoj. Kaj mi ne plu estas peranto.

Mi posedas esperantan bibliotekon kun ĉ. 800 libroj kun farita listo pri ili.

GASTIGADO- mi gastigis multajn amikojn el Koreio, Japanio, Rusio, Turkio, Hungario, Rumanio. Italio, Bulgario, Germanio, Pollando, Francujo, Australio, N. Zelando ktp.

Mi ankaŭ tradukis bildstriojn, konstruadis krucenigmojn kaj lastatempe per rete korespondante, korektas la tekstojn de miaj iamaj studentoj. En 2008 mi tradukis al serba la Rektan metodon lerenolibron kiun verkis Stano Marček

Kiam ni, kun miaj klubanoj kongresas aŭ iras al diversaj aranĝoj preskaŭ regule mi estas la grupgvidanto kaj la organizanto de la vojaĝo eksterlanden, uzante miajn spertojn.

Ĉi momente mi estas Komitatano A de UEA el Serbio.

En 2007 mi estis elektita kiel membro de Internacia Rajtigita Ekzamenataro IRE Dum UK en Rotterdamo en 2008 mi gvidis Cseh metodan kurson al komencantoj.

Beogrado,  
la 30-an de aŭgusto> 2008

**Terezija Kapista”**

»Pri Burundio

Areo 27.834 km<sup>2</sup>

loĝantoj 6.264.000 -po 217 homoj en 1 km<sup>2</sup>- 65% da loĝantoj analfabetoj; meza vivlongeco 43 jaroj

Prezidanto aktuala Pierre Buyoya

Ekde la jaro 1993 militista registaro.

mono: burundi franko

popolo: hutu 85% , tutsi 14%, pigmejoj 1%«

□

## EL LETEROJ DE NIAJ LEGANTOJ

### ESPERANTO – SKOLTA MOVADO EN HUNGARIO

Saluton!

Suben mi sendas kelkajn informojn pri mi kaj movado. Mi sendas la malsupraĵajn dokumentojn kien nia movado atingis ĝis nun, por informi la legantaron

#### Ĝenerale pri la Skolta-movado

**Skolta movado:** La skoltismon fondis lordo Robert Baden Powell, angla generalo, en 1908, ĉefe por disciplinigi la varmegajn, aventuremajn junulojn, donante al ili eblecon vivi laŭ knabaj instinktoj, tamen lernante memstarecon, progresante laŭ pedagogiaj principoj. La ĉefaj celoj estas: pli sana, pli sincera, pli memstara, ĉiam helpema, servopreta, purviva, modesta, ŝparema, indulgema kaj bonhumora, tamen severa junularo, kiu konsideras ĉiujn - de iu ajn nacio, raso, religio kaj profesio - kiel fratojn. Kiel int. movado ĝi jam atingis la nombron de pli ol du milionoj kaj al la ĉiukvarjare aranĝitaj tendaregoj, nomitaj ĵamboreoj, venas kelkdek miloj el ĉiuj mondpartoj.

**Ĝi** radikiĝis en ĝi nur malrapide. En 1918 angla trupestro, A. W. Thomson (ps. Avoto) ekpensis sur franca militkampoj la ideon: por helpi la int. amikiĝon kaj reciprokan servon de la junularo oni fondu Skoltan E-istan Ligon (SEL). Li fariĝis prezidento, lia frato, subtrupestro K. Graham Thomson, la honora sekr. Poste Norman Booth, Netherton, brita trupestro, fariĝis la honora ĝen. sekr., kiu kun la kasisto D. H. Davis multege laboris por organizi SEL. La celoj de SEL estas: 1. disvastigi skoltajn idealojn per E, 2. disvastigi E-n inter la skoltaro, 3. krei skoltan E literaturon, 4. eldoni int. skoltan revuon 5. solidariĝi la senton de frateco, komunan en la skolta kaj E movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

Intertempe la Skolta Esperanto-Ligo publikis kelkajn libretojn:

1969: Ĵamborea Lingvo, skolta lernolibro, verkita de J. Ko Hammer kun helpo de J. Le Couteur kaj aliaj.

1974: Skolta kaj Tenduma Terminaro verkita de J. Ko Hammer.

1975: Pli Vastaj Horizontoj, manlibro pri internacia skoltado, verkita de 40 SEL-anoj.

La bultenon de SEL estas La Skolta Mondo. Ĝi aperas ĉiu kvaronjaro.

La Centra Organiza Komitato de JOTI (ĵamboreo en Interreto), la tutmonda skolta renkontiĝo, kiu okazas ĉiujare en la tria semajnfino de oktobro, en 2004 akceptis Esperanton en sia TTT-ejo. La tradukon verkis Stein Hautekees, Nacia Reprezentanto de SEL por Belgio.

#### Hungario debutas al SEL Mondo

Ekde 3.-a majo 2006 kiam Hungario povis prezenti nacian reprezentanton, okazis multaj aferoj. Antaŭe, la E-skolta movado en lastaj tempoj bedaŭrinde ne vivis sed nuntempe skolta laboro ekkomencis...

Ekiraj celoj de ĝi estas:

1. Fundamenti E-skoltan movadon per atento de hungaraj interrilatoj;
2. Serĉi kaj trovi aktivulojn;
3. Konatigi Skoltan Esperanto-Ligon en Hungario;
4. Konstruo de kontaktoj kun esperantaj kaj skoltaj organizaĵoj.

## Radikoj

En Hungario historio de Movado komenciĝis antaŭlonge. Jam en jaroj de 1920 komenciĝis organizado. Paŝo post paŝo naskiĝis esperantistaj skoltaj grupoj kaj sekcioj. Estis fondita Skolta Esperanto-Rondo, kiu funkciis inter 1930-1941. Hungara Skolta Esperanto-Ligo organizis dekan internacian tendaron apud Budapeŝto en 1931. Tie unufoje estis oficiala renkonto inter Hungara Skolta Asocio kaj SEL. Dum ĵamboreo de Gödöllő (apud Budapeŝto) en 1933 aferoj de esperanto aperis en ĉiutaga skoltavivo. Ĝis dua mondmilito movado disvolviĝis senrompiĝe. Dum milito Hungara Esperanto Asocio faris junularan sekcion, kiuj estis skoltoj. Ĝi nomiĝis No. 191. Toldi Miklós Skolta Trupo. (cetere ili ankaŭ nuntempe renkontas)

De 1948 oficiala skoltismo (ĝis 1989) ĉesis. Dum komunismo ĉi tiu movado estis malpermesata.

Post 3 jaroj de hungara revolucio (1956) okazis nekredibla afero.

## Historio de Esperanto Skolta Centro 1959

Post la revolucio gepatroj havis zorgon pri infanoj sed ekkomencis formiĝi spontaneaj grupoj. Unu lerta kaj kreativa homo - li nomiĝas Otto Falus – organizis grupon el siaj infanoj kaj aliaj amikaj infanoj. Unue ili faris stratĉampionecon de piedpilko poste ekformiĝis aliaj sekcioj (kaŝa skoltismo). En 1959 nomo de la loĝstrato ŝanĝiĝis. La stratnomo estas: Esperanto strato. (ankaŭ nuntempe ĝi nomiĝas tiel en Budapeŝto). Sur muro de strato tabulo anoncis ke ĉi tie agadis la „Esperantostrata trupo”. En tiu epoko nomiĝis : Esperanto Sportaklubo. Poste, en 1970 la klubo aniĝis al Hungara Esperanto Asocio kiel individuala membro. Ĉijare jam estis lia nomo: Esperanto Skolta Centro 1959. kaj havis ankaŭ ŝtampilon. Ĝis tiam la Unuiĝo havis daŭran observadon de polico. Krome la oficialaj komunismaj junularmovadoj ne ekzistis aliaj permesitaj movadoj. Funkcion de Esperanto Skolta Centro neniam kaj neniu helpis oficiale. Sekcioj estas: literaturo, skoltoj, sporto kaj teatraludo. En 1987 apud nomo de Esperanto Skolta Centro ili adoptis ankaŭ alian nomon. Ili fondis Sik Sandor Skolta Trupo. (Sik Sandor estis kristana skolta poeto kiu estis malpermesita poeto.) Post la granda reĝimŝanĝo de 1989-90 ili aliĝis al – jam ekzistantaj – skoltaj asocioj.

Bedaŭrinde Oĉjo Otto Falus estas tre malsana. Li ne uzas komputilon kaj ne povas paroli per telefono. Ankaŭ mi povis kontakti lin nur koresponde. Li ĝojas pro movado de SEL denove viglas kaj sendas skoltasaluton al ĉiuj!

Aktualo

Ĝis nuntempe, la asocioj de skoltoj ne tro okupiĝis per Esperanto ĉi tial ni bezonas denove konstrui E-skoltan movadon. Bonŝanco, ni havas radikojn, ni petas helpon el maljunaj skoltoj kaj ni provas uzi niajn interrilatojn.

Mi ekserĉis skoltajn asociojn. Unu el aliaj rapide respondis al mi kaj ili povus ~~esti~~ fari interkonsenton por futura kunlaboro. Eĉ, dum Junulara Esperanto Renkontiĝo (3-5 junio) en Hungario Lajos Zahonyi (nacia reprezentanto de SEL) faris prelegon pri Skolta Esperanto Ligo al kunsido de Hungara Esperanto Junularo. Ĉi tie okazis granda evento. Unu oficiala Interkonsento estis subskribita far de Hungara Esperanto Junularo, Asocio de Hungaraj Skoltinoj kaj Skoltoj kaj Skolta Esperanto Ligo –Hungario. Tiu ĉi interkonsento faris bonan bazon al daŭrigo de laboro.

## Futuro

Nune, ni faras bonan kontakton kun Hungara Skolta Asocio kaj ni provas kunlabori kun la Asocio.

Uzante interkonsenton ni planas unu retpaĝon kaj ni kontinuigos serĉon de esperantaj kaj skoltaj partnerorganizaĵoj. Ni provas reklami E-skoltan movadon kaj provas organizi E-skoltan eventon.

Skoltasalute

Záhonyi, Lajos  
Nacia Rerezentanto de SEL en Hungario

### **61-a IFEF KONGRESO en Triesto**

„Tre estimata redaktoro de Nordhungaria Informo!

Mi estos tre dankas al vi, se vi publikigos la jenajn anoncon en via GAZETO.

1) 61a IFEF-Kongreso - Triesto, Italio 23-29 majo 2009 (Postkongreso de la 30a de majo ĝis la 1a de junio 2009)

Triesto atendas Vin! Maro, montoj, milda temperaturo kaj... granda festado okaze de la 100-jariĝo de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio: ĉio ĉi je via dispono! Fakaj (kaj ne-fakaj) prelegoj, konatiĝo kun loka kulturo, ekskursoj province kaj regione en eksterordinara esperanta etoso: bonvenon al ĉiuj esperantistoj-fervoĵistoj kaj saman elkoran bonvenon ankaŭ al ĉiuj NE-fervoĵistaj esperantistoj! Pliaj informoj haveblas ĉe [www.ifeff.net](http://www.ifeff.net) kaj Triesta Esperanto-Asocio: [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it) kaj [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com) Poŝta adreso: Triesta Esperanto-Asocio - CP 601 Trieste Centro - IT-34132 Trieste - Italio

2) bonvolu disvastigi/publikigi/diskonigi la aldonitan informon/regularon pri la 3a Internacia Konkurso pri Kristnasko, kiu ricevis la patronecon de Triesta Komunumo, skabeneco pri Kulturo, okazonta en Triesto, Italio, fine de la jaro. (vidu aldonitaĵon!)

Koran dankon kaj karajn salutojn de

Elda Doerfler  
Triesta Esperanto-Asocio  
[testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)

## **TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO** lancas Internacian Konkurson - jaro 2008 pri la temo

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun ago de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la 10a de novembro 2008, siajn verkojn al la jena adreso:

ESPERANTO TRIESTE - C.P. 601 Trieste Centro  
IT-34132 TRIESTE - ITALIA

Oni rajtas kontribui per unu au pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorio:



- 1) desegnajo, maksimume unu A4-formata folio;
- 2) poeziajo.

La desegnajo havu komenton au frazon en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro.

La poeziajo estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtor/in/o.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

- \_ persona kaj familia nomoj;
- \_ ago;
- \_ lernejo kaj klaso;
- \_ posta adreso.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor/in/o.

Ciuj konkursajoj prezentigos al publiko dum la kristnaska periodo 2008.

La vizitontoj kaj elektota jurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj ago (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Por kromaj detaloj/informoj: [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it) au [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)

comune di trieste

assessorato alla cultura

### **Simo Milojeviĉ : Honora Membro de UEA !**

---

---

En la inaŭguro de la 93-a UK en Roterdamo la publiko bonvenigis per forta kaj longa aplaŭdo la decidon de la Komitato de UEA elekti s-ron Simo Milojeviĉ kiel Honoran Membron de UEA.

Simo Milojeviĉ naskiĝis la 14-an de decembro 1936 en Kunja Glavica, Trebinje (Hercegovino), Jugoslavio. Li esperantistiĝis fine de 1956. En la komenco de sia movada aktivado li estis sekretario de loka Esperanto-klubo, poste de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto. En 1963 li estis ĉefredaktoro de "Jugoslavia esperantisto", poste de "La suda stelo" (1964, 1967-69).

Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton. Post sia transloĝiĝo al Nederlando Milojeviĉ redaktis la revuon "Kontakto" (1970-74).

En 1974 li eklaboris en la Centra Oficejo de UEA, kiel vicdirektoro (1974-80) kaj redaktoro de "Esperanto" (1974-1984). De 1983 ĝis 1995 li estis ĝenerala direktoro de UEA. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). En sia 60-a vivojaro, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj labori kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA, de 1996 ĝis la fino de 2002, kiam li pensiĝis. Ekde la fino de 2007 li vivas en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino).

GK de UEA

fonto: Ret-Info  
<http://www.eventoj.hu>”

La miŝkolca EAR „Király, Lajos” gratulas al la nova Honora-membro de UEA!

Adrienne Pásztor

### Interesaj eroj pri IJK-2008 en Szombathely

-----

Iom da ciferoj:

- Aliĝintoj: 485 personoj
  - Partoprenintoj: 365 personoj el 36 landoj, 164 virinoj + 201 viroj
- La plej aĝa partopreninto havis 74 jarojn, la plej juna: 2 jarojn  
Averaĝa aĝo de partoprenintoj: 31 jaroj 4 monatoj kaj 12 tagoj

Plej multaj partoprenintoj venis el

- Germanio: 43 personoj,
- Rusio: 49 personoj
- Hungario: 60 personoj

sed venis ankaŭ el ekzotikaj landoj, kiel Korio, Pakistano, Vietnamio, Meksikio.

- Nomo de la urbo Szombathely signifas: "sabata ejo" - do la slogeno de la IJK estis: "De sabato ĝis sabato sabatumu en Sabatejo"!

- kaj en la kongresejo, kaj en la studenthejmo funkciis senpaga radia interret-konekto

- la vesperaj programoj okazis en la najbara teatra salono, kie estis sufiĉe da sidloko por ĉiuj

- manpleno de iamaj partoprenintoj de la fama IJK en Debrecen festis la postkvaronjarcentan daŭran esperantumadon :-)

- simile kiel en Veszprém 1999, ankaŭ ĉi jare la hungaraj organizantoj zorgis pri suneklipso por la kongresa semajno :-). Ĉi foje la kovrado de la suno ne estis plena (nur 17 %-a), sed ĝi denove rikoltis sukceson ĉe la partoprenintoj

- la koncerton de JoMo ĉiuj dezirantoj povis ĝui ĝis la fino, ĉar la urbaj fajrobrigadistoj havis alian okupon: ili preparis sin al la "Granda Akvobatalo", kiu jam estas tradicia programero dum IJS-j: 1-2 fajrobrigadista aŭtomobilo kun ŝpruc-tubegoj lud-batalas kontraŭ esperantistoj, kiuj estas armitaj nur per akvopistoloj :-)

- En la fotoalbuma kolekto nun (2008-08-16) troviĝas 3557 fotoj, 3 albumoj de urbaj/regionaj gazetoj, kaj 8 videaj registraĵoj... Trovu la kolekton ĉe: [http://www.tejo.org/vikio/IJK\\_2008](http://www.tejo.org/vikio/IJK_2008)

- En la lasta vespero oni gratulis DÉVAI Gergő, prezidanto de HEJ kaj GEDE Krisztina, sekretario de Hungara E-Junularo, kiuj havis geedziĝfeston unu monaton antaŭ la kongreso!

- La organizado de IJK en Szombathely subtenis per infrastrukturo, financoj kaj organiza helpo "Esperanto-Centro Eventoj" en Budapeŝto.

- La preparo kaj surloka realigado de IJK okazis per vere internacia junulara kunlaboro: la agadon de la ĉeforganizanto Acsádi Vera helpis ne nur la teamo de Hungara E-Junularo, sed en granda parto Tina Tišljar el Kroatio kaj Carsten Mischke el Belgio, la retejon prizorgis Dirk Bindmann el Germanio! Dankojn al ili!



- Ĉe la fino de la semajno okazis pluraj postkongresaj aranĝoj: komuna veturado al la kroatia MIRO, okazis semajnfina tendaro ĉe la lago Balatono, okazis MELA en Délegyháza, komuna vizito al la Kolektaĵo Fajszi en la Budapeŝta Fremdlingva Biblioteko, ktp.
- Kiel fermo de la IJK-rilataj aranĝoj, la 6-an de aŭgusto okazis Esperanta Gulaŝ-Kunveno en la ĝardeno de la Budapeŝta Esperanto-Domo Eventoj, kie la ĉeestantaj 35-40 IJK-partoprenintoj estis regalitaj per tipaj hungaraj manĝaĵoj: langoŝo, palaĉinto, gulaŝo, tavolokuko
- kaj kompreneble bongusta, ruĝa hungara vino... Vidu artikolon kaj foton ĉe: <http://www.esperanto.hu> --> "aktualaj novaĵoj"

inf: Szilvási László

## Rotterdamo – UK

La 10-an de Aŭgusto en la departementa tagĵurnalo Kisalföld aperis letero de leganto pri la 93a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Rotterdamo. La leterskribanto raportis pri la ĉefaj eventoj de la Kongreso, pri kelkaj fakaj kunvenoj kaj pri ekskurso aranĝita al la regiono de la ventomueliloj. Fine li mencias kelkajn detalojn el la akceptita rezolucio de la kongresa ferma kunsido.

d-ro Imre Ferenczy



Sur la foto videblas d-ro Imre Ferenczy kaj d-ro Makabe dum la ekskurso, tiu lasta Japano estas: okulkuracista profesoro, sed vivanta en Germanio. (L.a magyar részen levő fotot.)

Jen. la traduko de la artikolo aperinta en la tagĵurnalo Kisalföld:

## Hungaraj esperantistoj en Nederlando

En la pasintaj tagoj finiĝis en Rotterdamo la 93-a Universala Kongreso de Esperanto, partoprenis ĝin 1800 delegitoj el sepdek landoj - inter ili 50-membra hungara grupo. Dum la unusemajna eventoserio oni festis la 100-jaran fondiĝdatrevenon de la Universala Esperanto-Asocio. La ĉeftemo de la kongreso estis: "Lingvoj, - la trezoro de la homaro, - en kies kadro la delegitoj konversaciis pri la disvastigo, aplikado de la internacia lingvo kaj pri la instruado.. Ankaŭ la diversaj profesiaj branĉoj kaj hobiaj rondoj kunsidis, kiel ekzemple la medicinistoj, pedagogoj, fervojistoj, juristoj, radioamatoroj, astronomoj. Iun vesperon la urbestro aranĝis akcepton por 200 invititaj kongresanoj en la salonego de la urbodomo.

La fervojistan laborkunsidon de la kongreso Istvan Gulyas, fervoja ĉefkonsilisto gvidis, dum la kunsido de la medicinistoj D-ro Imre Ferenczy ĉefkuracisto (Győr) prezidis. Pro elstara lingvista kaj eduka agado D-rino Ilona Koutny profesorino de la Universitato en Poznano kaj en Nederlando laboranta Katalin Kovats ricevis honorigon kaj distingon.

Esperantlingvaj teatraĵoj, muzikaj programoj, ekumena diservo, junularaj renkontiĝoj riĉigis la cetere densan programon. Oni organizis plurajn ekskursojn al la plej belaj regionoj de la lando. Al la ventulumeliloj protektataj de Unesko ekskursis la plimulto de la kongresanoj, la grandparto de la ventulumeliloj ankaŭ nuntempe funkcias. Ilia ĉefa celo estas pumpi la akvon el la poldero (areo sub la marnivelo) al la kanalo. Sed okazis ekskurso ankaŭ al aliaj urboj, ĉefe al Hago kaj Amsterdamo.

La Komitato de UEA ĉikaze akceptis la aliĝon de pli nova afrika lando Burundi al UEA. Dum la ferma kunsido akceptita rezolucio aludas al la grava rolo de la lingvoj en la scienco kaj kulturo. La kongresanoj petas la diversajn organizaĵojn kaj instituciojn kunlabori por la pli efika uzado de la internacia lingvo.

Okaze de la 150-jara naskiĝdatreveno de Zamenhof, aŭtoro de la lingvo en lia naskiĝurbo Bjalistoko okazos la venontjara universala kongreso, kaj en jaro 2010 Habano, la ĉefurbo de Kubo akceptos la esperantistojn de la mondo.

Imre Novaki, Győr

(Rimarko: I. Novaki estas membro de la Fervojista E-Fakgrupo, respondeculo por informi la gazetaron pri la lokaj kaj aliaj E-eventoj)

La artikolon de Imre Nováki, esperantigis D-ro Imre Ferenczy

### Anonco pri beboj

Ĉi-maniere ni gratulas gesinjorojn Zsolt Farkas kaj lia edzino Julianna Vas-Szegedi, okaze de ilia novnaskita bebo (filo) Zsolt Máté, kaj al László Szilvási kaj lia edzino Kata Horváth, okaze de naskiĝo de ilia filino Diandra.

Ni esperas, ke la gepatroj instruos ambaŭ bebojn denaske ankaŭ al la lingvo Esperanto.

Ni deziras multe da ĝojo al ambaŭ familioj.

Adrienne, sinjorino Pásztor nome de Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”

### Agado per blogado

En Danio tiel kiel ĉie malofte aperigas la gazetaro novaĵojn aŭ artikolojn pri Esperanto. Eĉ se oni sendas al iu redakcio informojn pri gravaj esperantaj aŭ lingvaj aferoj oni ignoras ilin. Ĉu ekzistas gazetara konspirado de mortsilento? Verŝajne ne, tamen kiu povas konkurenci kun skandaloj pri la politikistaj pekoj kaj petrolaj prezoj ktp.? Tial por ke incitu la intereson de la loĝantaro, kial ne blogu?

Tial mi rezonis, do la 1-an de majo mi dane ekblogis ĉe la reta versio de la dana gazeto '24 timer' (24 horoj). Tiu gazeto estas unu el la kvar ĉiutage jen rete jen papire senpagaj gazetoj, kiuj estas tutlande disdonitaj. 24 timer estas ligita al la tutlanda serioza gazeto 'Politiken'. Pere de la reta gazeto registritaj legantoj rajtas diskuti novaĵojn, debati pri diversaj temoj kaj blogadi pri ia ajn. Nuntempe la registrita legantaro proksimiĝas 85,000, ŝajnas ke el tiu la plej grandparto konsistas el gejunuloj.\*

Blogo estas persona taglibro. Principe oni povas skribi io ajn en sia blogo. Mi elektis skribi pri miksaĵo de ĉiutagaj eventoj, biografiaj rakontetoj pri mi mem kaj pri miaj forpasitaj familianoj kaj geamikoj; tamen pri vivantaj familianoj aŭ geamikoj mi estas tute diskreta. Plue mi malkaŝe informas pri miaj sociaj sintenoj kaj kompreneble pri mia vigla kaj feliĉa esperanta vivo. Survoje mi jam informiĝas pri Esperanto, la esperanta kulturo, la historio kaj la nuntempa agado. Mia stilo aŭ fasono estas malstreĉa kaj distra, ĉar ŝajnas ke la legantaro atendas la distraĵon. Iom post iom mi jam ricevis invitojn de aliaj grupoj ĉe 24 timer, i.a. la Eŭropa grupo, en tie okazis vigla diskutado pri la eventuala rolo de Esperanto en Eŭropo.

Ĉu indas la blogado? Post nur du monata blogado mi konstatas la jenan:

1. Inter la 1-a majo kaj la 19-a de aŭgusto oni 10, 945 foje klakis sur mian ligilon. Tiu ne signifas, ke la klakantoj ĉiam legas la blogojn. Meznombro 30 – 35 legas ĉiun kontribuon.
2. Sur la komenco-paĝo de la gazeto estas skribitaj la tielnomataj etiketoj; t.e. la temvortoj de la kontribuoj. Jam de longe Esperanto jam estas la plej granda vorto sur tiu ĉi paĝo – eĉ multe pli granda ol vortoj tiel kiel 'infanoj', 'somero' kaj 'amikoj'.
3. La malgranda grupo da esperantistoj ĉe la gazeto jam kreskas de 6 ĝis 9.
4. La hejmpaĝo de 24 horoj havas kalendaron, kaj en tiu staras informon pri la lingvo-festivalo kaj la malferma tago de KEK.

Tiu estas modesta rezulto, tamen estas rezulto.

Dum la internacia ĵurnalisto-kongreso en Vilno, en kiu mi partoprenis, mi parolis kun Gunna Gällmo de Svedio. Li ankaŭ blogas ĉe sveda gazeto.

<http://metrobloggen.se/jsp/public/index.jsp?article=19.97499>

Post la reveno de Vilno, Jens Steengaard Larsen verkis kvin artikolojn pri la kongreso.

[http://24.dk/user/jens\\_s\\_larsen/perma/2008/06/01/Udflugtsdag](http://24.dk/user/jens_s_larsen/perma/2008/06/01/Udflugtsdag)

Jen granda laboro – ĉu indas, ĉu endas?

Tiu estas unu el la rimedoj interesigi la homaron pri Esperanto. Se sufiĉe emas klaki kaj legi la informon, eble la ĵurnalistaro pli atente kaj respekteme legos la oficialajn informilojn, kiujn ni sendos.

Ĝis tiam karaj gesamideanoj bonvolu viziti mian blogon, kaj eĉ pli utile estus, se vi mem fariĝus bloganto.

(2008 dana logantaro en tute 5.475.791) . <http://da.wikipedia.org/wiki/Danmark>

Betty Chatterjee - Danio

## CERBAJ IMPULSOJ

1. Samideanoj estas feliĉaj homoj, ĉar sufiĉas, ke unu pensas por ĉiuj.
2. Guto malgranda konstante frapante kaŭzas – kapdoloron.
3. Ne ekzistas plu timo de la fluganta, sed de la malplena telero.
4. En vanaj promesoj ĉiam superfluas espero.
5. Por burokrataj vermoj la ŝtata pomo estas – paradiza.
6. Suspektindaj estas «pacaj» batalantoj kiuj uzas glavojn soifantajn.
7. Nigra ĉemizo estas senmalica se ĝi estas nigra de malpuro.
8. Ekzistas popolgvidantoj kiuj estas senmortaj nur dum ili vivas.
9. Lau posedkvadratoj de loĝejo ni estas dividitaj je: loĝantoj, kunloĝantoj, subloĝantoj kaj – senkvadrataj loĝantoj.
10. La mondo estas pli bone videbla sur la socia ol sur la geografia karto.

03.04.2000.

Dinko Matkovic – Insulo Hvar

**Stefano Pál**  
**HISTORIO DE LA MIŜKOLCA ESPERANTO-MOVADO**  
**PARTO VII-a.**  
**- daŭrigo -**  
**Universala Kongreso kaj Abaújszántó**  
**1982-1983**  
**Strato D-ro Kolomano Kalocsay, muzeo, memorarbo.**

**Landa Renkontiĝo - malkovro de Abaújszántó.**

En 1982 la Esperanto-grupo de la „Rónai Sándor” Kulturdomo jam estas 25 jara. En ĉi tiu jaro Miskolc havas gravan rolon en la direktado de la departementa movado. Denove oni aranĝas(2- 8 majo 1982, Balatonfüred ) en Hungarlando la Fervojistan Esperanto-Mondkongreson, en kies aranĝado la miŝkolcanoj partoprenis. La 25-an de marto en iu miŝkolca lernejo/Avas, lernejo n-ro 30/ oni aranĝas la departementan sciencajn-teknikan pioniran demonstracion, kie estis ankaŭ Esperantaj lingvokapabla konkurso kaj ekspozicio.

La B.A.Z. departementa TEK aranĝis la Landan Esperanto-Renkontiĝon / LER / la 25-26-an de julio 1982. La renkontiĝon partoprenis 50 personoj el diversaj partoj de la lando, eĉ estis ankaŭ jugoslavaj partoprenantoj. Laŭ la unueca opinio la LER sukcesis tre bone, ĉar per la prezento de pitoreskaĵoj kaj historiaj memoraĵoj de Miskolc kaj Nord-Hungario ĝi akiris multe da amikoj por la urbo kaj la departemento.

Dankon al d-ro Ladislao Molnár, adjunkto de la Pedagogia Altlernejo de Sárospatak, kiu malkovris Abaújszántó-n, naskiĝlokon de D-ro Kolomano Kalocsay. Tiu loko iĝis pli malfrue Esperanto- memorloko. Granda rezulto de agado de Barnabo Batta, prezidanto de la B.A.Z. departementa TEK estis la prezentiĝo de la naskiĝloko. La grandvilaĝa konsilantaro / Abaújszántó estas urbo ekde jaro 2004./ eternigis la memoron de la mondfama kuracisto, esperantisto, artradukisto, poeto kaj lingvisto per stratnomdonado kaj marmora memortabulo la 21-an de marto 1982. La grandsignifan okazintaĵon partoprenis ĉ. cent personoj el la tuta lando. Dankon al la grandvilaĝa konsilantaro, al Jozefo Lénárt, mortinta sekretario de la konsilantaro kaj la la mortinta Gabrielo Bényei, sindikata estro, al Imola Széphalmi s-ino Burkus, kiuj helpis estigi tiun Esperanto-memorlokon. La Abaújszántó-anoj – la konsilantaro kaj la „Petőfi Sándor” Kulturdomo esprimis sian laŭdon por la aranĝo de la neforgesebla memorfesto al la miŝkolcaj esperantistoj. Patrino de la mondfama d-ro

Kolomano Kalocsay ripozas en tombejo de Abaújszántó. Lia filo starigis la du metrojn altan nigran marmorobeliskon, kiu jam estas videbla de malproksime.

### **Sukcesoj de Miŝkolcaj esperantistaj - Antaŭ pli nova Universala Kongreso**

En Miskolc ĉiam pli bone disvastiĝas Esperanto. Ties miŝkolcaj kulturantoj, disvastigantoj prezentiĝas per belaj sukcesoj. Komputika fakrondo de „Földes Ferenc” Gimnazio prilaboris la Esperantajn lingvajn taskojn helpe de komputilo. Por tiu prilaborita tasko ili gajnis dum iu internacia konkurso – aranĝita en Budapeŝto – la ĉefpremion, unu komputilon. La famon kaj fotojn de la gajnintoj Budapeŝta Informilo, fakgazeto komunikis sur la titolpaĝo.

D-ro Nikolao Fehér, ano de Esperanto-fakrondo de „Rónai Sándor” Kulturdomo tradukis poemojn de Petőfi kaj ceterajn poemojn, per kiuj li atingis sukcesojn. Tiujn tradukaĵojn publikigis HUNGARA VIVO kaj ankaŭ la centra gazeto de la Itala Esperanto-Asocio. Liaj artikoloj kaj humuraĵoj aperas ankaŭ en Budapeŝta Informilo.

Samideano Barnabo Batta rolis sukcese en Pollando en literatura konkurso de Monda Turismo. Tiel li gajnis rajton partopreni la kongreson de la svedaj esperantistoj.

D-ro Vidor Csiky ofte rolas en programo de la Kalocsay-Baghy Ora Duopo-grupo, kiu tradukis al Esperanto verkojn de Csingiz Ajtmatov.

Esperantistoj de la miŝkolca Vörösmarty Kulturdomo invitis d-ron Franciskon Jáki, anon de la Instrua Komitato de HEA; li prelegis per projektitaj bildoj, grandsukcese. Ankaŭ la Medicina Esperanto-grupo havas multe da aranĝaĵoj. Suzana Gerő senlacige organizas la anojn kaj prelegas por handikapuloj.

En multe da bazlernejoj en Miskolc okazas sisteme lernado de Esperanto. En la Táncsics-placa bazlernejo oni same instruas sisteme Esperanton kiel duan elektitan lingvon. Ankaŭ la bazlernejo de Szirmabesenyő atingis elstarajn sukcesojn. Ĝojinde estas, ke la komunumo de la Esperantan lingvon intruantaj pedagogoj ĉiam pli grandiĝas, ĉiam pli multaj akiras la rajton instrui Esperanton.

### **Universala Kongreso - 5000 partoprenantoj el 60 landoj**

En 1983 aranĝanto de la 68a Universala Kongreso estas Hungarlando, ĝin partoprenis pli ol 5000 delegitoj de 60 landoj. Ankaŭ la departementaj kaj miŝkolcaj esperantistoj entuziasme prepariĝadas por partopreni la kongreson. Ili ja estis plurkiale interesitaj en la kongreso. La eldonejo „Belarta Fondaĵo” eldonis inicie de Barnabo Batta en tri serioj kolorajn bildkartojn, sur kiuj estis la verda, kvinpinta stelo de Esperanto kaj emblemo de la Universala Kongreso.

La unua serio prezentas la ĉefurbon kaj niajn kvar regionajn grandurbojn, inter tiuj Miŝkolcon. Tio estas unika ankaŭ en la mondo.

La Miŝkolca Kuracista Medicina Esperanto-Fakgrupo estas ĉiam pli vigla. Fine de julio 5 personoj partoprenis en Ĉeĥoslovakio en Poprad iun internacian kuracistan kongreson. Samtempe 5 personoj entreprenis kuracistan servadon dum la Budapeŝta Universala Kongreso, helpante la laboron de la kongreso.

Kvin lernantoj de bazlernejo de Szirmabesenyő rekompence povis partopreni programon de gejunuloj.

### **Internacia vinkonkurso - D-ro Kolomano Kalocsay-memorĉambro**

La 1983-jara vinkonkurso estis aparta programo de la okazintaĵoj en Abaújszántó, pri kiu ankaŭ la internacia Esperanto-gazetaro rememoris. 40-specaj diversaj drinkaĵoj / vino, brando, ĉampano/ konkuris antaŭ oficiala, ŝtata fakjurio. La de la diversaj entreprenoj kaj institucioj

ofertitajn premiojn gajnis finnaj /la ĉefpremio Osmo Buller/, hispanaj, hungaraj kaj francaj esperantistaj konkursantoj, kiuj ricevis de la ĵurio ankaŭ diplomojn. La bone organizita, bonetosa konkurso estis unika en la historio de la Esperanto-movado. La miŝkolcaj kaj lokaj esperantistoj faris bonan organizan laboron.

Em la Lokhistoria Muzeo de Abaújszántó, konsente kun la Borŝod-Miŝkolca Muzea Organizaĵo elformita D-ro Kalocsay- memorĉambro malfermis novan epokon en la vivo de la grandvilaĝo. Ĝia festa inaŭguro okazis dum la 1983-jara hungarlanda U.K., en ĉeesto de grandnombra ekster- kaj enlanda esperantista delegitaro. Ĝin ĉeestis ankaŭ pluraj mondfamaj esperantistaj poetoj, verkistoj kaj lingvistoj. La tuttaga kultura kaj literatura programo starigis vere laŭmeritan memoron al la naskito de la grandvilaĝo. Tiutempe, la 3-an de Aŭgusto 1983oni plantis sur la korto de la muzeo de Abaújszántó la D-ro Kalocsay- memorarbojn, iun arĝentan piceon / Picea pungens var. Argentea./.

Grava okazintaĵo de la tuttaga aranĝaĵo estis la fondo de la Internacia Kalocsay-Memorkomitato, kies anoj iĝis kelkaj BAZ-departementaj kaj miŝkolcaj esperantistoj, rekone al tiu organiza laboro, kiun ili faris en la elformigo de la Esperanto-vivo de la grandvilaĝo.

La grandvilaĝa konsilantaro de Abaújszántó en Februaro de 1984 dum iu festa kunsido decidis pri farigo de Kalocsay-memorbusto kaj ĝia starigo en la korto de la muzeo. Por ĉi tiu celo ĝi voĉdonis unuece 40000.-forintojn. La invititaj 10, lokaj, ŝtataj, kooperativaj entreprenoj aliĝis al la oferto, kaj ankaŭ en ĉiuj ceteraj laboroj ili promesis siajn helpojn. La konsilantaro, bonvenigante la helpojn de la entreprenoj, donacis al la reprezentantoj de ĉi tiuj entreprenoj Kalocsay-portreton. Ankaŭ s-ro Barnabo Batta ricevis memorportreton kaj laŭdon.

Ada Császár, estrino de la Internacia Komitato por Honoro al D-ro Kálmán Kalocsay, kaj perantino de la Miŝkolca Esperanto-Movado preparis esperantlingvan priskribon de la vivo kaj verkaro de d-ro Kolomano Kalocsay prepare al la eldono de libro, kiu enhavas 8300 prozajn vicojn, 1430 versojn, 3165 biografiajn indikojn kaj 235 fotojn.

En decembro de 1983 la bazlernejo n-ro 40 de Miskolc prezenzis sian memstaran Esperanto-programon.

En la bazlernejo n-ro 24 de Miskolc Esperanto jam estas elektebla lernobjekto. Ĉi tiuj rezultoj laŭdas la laboron de s-ino Zoltán Kővári kaj s-ino Zoltán Szabó Pap, direktorinoj.

S-ino Gyula Várhelyi, pedagogo instruas Esperanton, lingvon de la paco kaj amikeco en bazlernejo de Tokaj.

### **Esperanto ankaŭ en la mezlernejoj.**

**1984-1986**

#### **La bildkartoj devenas de Miskolc.**

#### **Jaro de pedagogoj - Antaŭ dudek jaroj oni komencis instrui.**

En 1984 tre ege vigliĝis la instruado de Esperanto en Miskolc kaj en BAZ-departemento, dank' al s-ro Barnabo Batta, kiu faris bonan propagandon kaj organizadon inter la pedagogoj. La intensa lernokurso havis 50 partoprenantojn, post kiu pli ol 40 pedagogoj faris sukcesajn ekzamenojn en julio kaj en septembro, el inter tiuj 30 personoj anonciĝis al perfektiga kurso, kie ili ricevis preparon al mezgrada „B”-lingvoekzameno.

Estas tre ega sukceso, ke en 3 miŝkolcaj mezlernejoj, en unu Leninurba, 4 Miŝkolcaj bazlernejoj kaj 11 regionaj bazlernejoj 23 pedagogoj instruas oficiale la Esperantan lingvon, sume al 320 gelernantoj.

Post la 1964 / 65a unua lernoĵaro en la kulturdomo de Szirmabesenyő la infanoj prezentis al la gepatroj kaj gastoj la lernitaĵojn. Fotoj gardas entuziasmajn anojn de la unuaj grupoj, sonbendoj gardas la esperantlingvajjn kantojn, poemojn. La programojn la infanoj anoncis kaj



hungare kaj esperante. Ekde tiam pasis 20 jaroj. Se ni komparas la malnovajn kaj 1984-jarajn martajn sonbendojn kaj fotojn, ni havos agrablajn travivaĵojn. Tio estas vera kulturhistoria valorajo, tio ne perdiĝos por la posteularo.

Nome pluraj albumoj konservas la fotojn, desegnaĵojn, gazetartikolojn, memorojn, kiuj donis eminentan rangon al ĉi tiu eta komunumo, multfoje rolinta dum Universalaj Kongresoj, ankaŭ eksterlande. De jaro al jaro estas kutima vidaĵo, ke sidas inter la aŭskultantoj Maria Busai, instruistino, kiu komencis instrui al la unuaj lernantoj antaŭ 20 jaroj la simplan, logikan, 28 literojn, 35 prepoziciojn, 35 afiksojn havantan lingvon. Apud ŝi ŝia disĉiplino, Terezia Csík Bodnár sidas, ankaŭ al ŝi estas dankeblaj la atingitaj sukcesoj. Ankaŭ Márta Váry helpis sisteme la instruadon ekde la komenco per fakliteraturo. En Miskolc du lernejoj / la 40-a kaj la 24-a / entreprenas pioniran rolon sub gvidado de direktorinoj s-inoj Zoltán Kóvári kaj Zoltán Pap Szabó. En 1984 oni aranĝis Landajn Esperantajn Junularajn Tagojn en la Universitato de Miskolc, en ties organizado partoprenis ankaŭ la miŝkolcaj esperantistoj.

- ni daŭrigos -

Esperantigis László Pásztor

## Anoncoj

### Ni invitas ĉiun interesanton al du eventoj

#### Esperanto libroekspozicio

Je la 16-a horo de la 17-a de Septembro 2008: d-ro profesoro Georgo Nanovfszky :Honora prezidanto de HEA inaŭguros Esperanto-libroekspozicion en la urba Biblioteko „Rákóczi, Ferenc II” en Miŝkolco. La ekspozicio estos aranĝita okaze de 100-jariĝo de UEA kaj 95 jariĝo de la instruado de la lingvo Esperanto kaj la movado en urbo Miŝkolco.

Organizantoj estas: Geedzj Pásztor

#### Esperanto Memorĉambro en Abaújszántó

En la pitoreske situanta urbeto Abaújszántó, okazos la 27-an de Septembro 2008 Kalocsay-memorifesto okaze de la 25-jariĝo de lia memorĉambro.

La festa programo komenciĝos kiel antaŭjare. Sed al peto ni sendos pliajn informojn. Al la florkronigo floroj, florkron-porto bezonatas pere de la de malproksimo venantoj.

Kolektiĝejo estos en la Kulturdomo, same, kiel pasintjare. La festa programo okazos kaj en la Lokhistoria Muzeo, kie estas la Kalocsay-memorĉambro, kaj ĉe la surstrata busto de K.Kalocsay, ĉe lia memortabulo kaj ĉe la patrinto de d-ro Kolomano Kalocsay.

La programon partoprenos esperantlingve ankaŭ bazlernejoj de Abaújszántó, krom la aliaj programeroj. La programon kolorigi loke, ni akceptas ĉiun helpon de la partoprenantoj de la evento. Post nia festa programo eblas tagmanĝi en la loka restoracio, tagmanĝo mendeblas. Post la esperantista programo la Urbeŝtaro de Abaújszántó atendas nin al festa kultura evento: al la Vinrikolta festo de urbo Abaújszántó.

Bonvolu sin anonci al partopreno ĝis la 25-a de Septembro, ĉe Adri Pásztor pasztor.laszlo4@chello.hu aŭ mobile: +36 70 570 8895

La eventon aranĝas la Urba Registaro de Abaújszántó kaj Geedzj Pásztor.

## 100 jariĝo de la esperanto movado en la pollanda urbo ŁODZO

La 100 jariĝan feston de tiu okazintaĵo (21-24.08.2008), partoprenis geedzoj Pásztor el urbo Miŝkolco.

Ni fartis tie bonege dank' al la organizantoj, vetero, belega lando kaj lingvo Esperanto.

Pri la evento ni skribos pli abunde kaj montros fotojn en nia oktobra gazeto.

Ni dankas nun por la invito, la agrabla esperantista etoso de la evento: al la altestimata prezidantino de PEA: Halina Komar, al la organizantaj Lodzaj geesperantistoj kaj la kromaj volontuloj de la tuta pola esperantistaro.

Ni deziras multe da sukcesoj al ilia plua poresperanta agado!

Vivu Esperanto, la esperantistaro, kaj la pola-hungara amikeco!

Geedzoj Pásztor



### **BILDOJ:**

1. Sur la unua foto videblas s-ino Halina Komar, prezidantino de PEA (blonda damo)
2. Sur la dua foto Andrzej Sochacki - la fotisto - montras al ni s-inon Ela Karczewska: la ĉeforganizantinon de la 2009-jara Bjalistoka UK – kaj s-ron Robert Kaminsky: la ĉeforganizanton de la nuna Esperanto Landkongreso en Lodzo.



**BILDOJ:**

1. Sur la unua foto s-rino Halina Komar prezidantino de PEA videblas (blonda damo)
2. Sur la dua foto Andrzej Sochacki - la fotisto - montras al ni s-rinon Ela Karczewska: la ĉeforganizantinon de la 2009 jara Bjalistoka UK – kaj s-ron Robert Kaminsky: la ĉeforganizanton de la nuna Esperanto Landkongreso en Lodzo.



## **NORDHUNGARIA INFORMO**

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: [pasztor.laszlo4@chello.hu](mailto:pasztor.laszlo4@chello.hu)